Jura Semajno

Semajna Bulteno de Internacia Jurista Esperanto-Asocio

Oktobro 3 : 2025

# DORLOT-BESTOJ SIMILAS AL BAGAĜO ĈE AER-TRANSPORTADO



Pasint-semajne, la Kortumo de Eŭropa Unio juĝis, ke dorlot-bestoj devas esti konsiderataj kiel "bagaĝoj", se paroli pri aer-transportado. Do, oni ne rajtas postuli kroman mon-kompenson se ĝi estas perdita dum vojaĝo.

Ĉi tiu kazo prezentiĝis en la jaro 2019, kiam pasaĝero en la flugo de Bonaero en Barcelonon vojaĝis kun sia dorlot-besto. La besteto vojaĝis ene de besto-portilo ĉe la holdo de la aviadilo, tamen dum la ŝarĝo aŭ la malŝarĝo la dorlot-besto fuĝis el la portilo kaj ĝi neniam revenis. Pro tiu "perdo" la pasaĝero postulis 5000 eŭrojn kiel mon-kompenson pro la damaĝo okazigita. La aer-kompanio akceptis sian respondencon rilate la perdon kaj oni agnoskis, ke la pasaĝero devis esti mon-kompensita, tamen laŭ la mon-limo antaŭvidita por kia ajn bagaĝo perdita.

La Eŭrop-unia Kortumo juĝis, ke la konvencio de Montrealo pri Aer-transportado agnoskas nur homojn aŭ bagaĝojn. Kompreneble homo estas persono, do bestoj devas esti entenata ene de bagaĝoj. Tiel, la kortumo deklaris, ke la aer-kompanio devas mon-kompensi la posedanton de dorlot-besto, same kiel posedanto de bagaĝo, sen kroma mon-kvanto pro la fakto, ke ĝi estas besto. Kompreneble ĉiuj pasaĝeroj rajtas deklari pli grandan valoron de la bagaĝo, tiel mon-kompenso pro ebla perdo pli-altiĝus, tamen tio pli-altigus ankaŭ la koston de la transportado.

# *Vorto de la Semajno*

**DELIKTO**



1. Kontraŭleĝa puninda ago.

2. Punenda konduto.

**Deliktinto:** Tiu, kiu kulpis delikton.

Sinonimoj: *krimo, faŭlo.*

*Deliktoj troveblaj en kriminala juro estas:*
*murdo, seksperforto, rabo, ŝtelo, fraŭdo, korupto, kalumnio kaj aliaj.*

# *Internacia kalendaro*

**24-an de oktobro**: *Internacia tago de Unuiĝintaj Nacioj.* 

**26-an de oktobro**: *Nacia tago de Aŭstrio.* 

## *Kunlaboru kun Internacia Jurista Esperanto-Asocio !*

*Kiel esperantisto kaj juristo vi povas kunlabori kun IJEA, kiel?*

- *Verku artikolon por la revuo "Jura Tribuno Internacia". Konu la revuon ĉe https://www.esperantojuro.org/revuo/jura-tribuno-internacia/*

- *Traduku juran vortaron Eo-via nacia lingvo. Vidu liston de vortoj ĉe https://www.esperantojuro.org/jura-vortaro/juraj-vortaroj/*

- *Informu al ni pri atentofrapaj juraj novaĵoj el via lando.*

**jurista@esperanto.ac**

**Internacia Jurista Esperanto-Asocio * www.esperantojuro.org**